Wilhelm Müller,

# Sur la rivero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Tre gaje susurinta
River' sovaĝa vi,
Kalmiĝis vi, ne diras
Adiaŭ vi al.mi.

Kovrite per malmola,
Rigida ŝelo en
Sablej' malvarma kuŝas
Vi nun senmove jen.

Enskrapas mi la nomon
De mia karulin',
La tagon kaj la horon
Enskribas mi sur vin:

La tagon, kiam ekvidis
Kaj adiaŭis mi ŝin,
Kaj ĉirkaŭ ambaŭ turnas
Rompita ringo sin.

*Traduko de la Germana poemo "Auf dem Flusse" de* Wilhelm Müller *(∗1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2007-01-27.*

*MR-452-2 / Arg-805-1615 (2013-01-31 21:04:03)*

*Pri la poeto vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_M%C3%BCller`.

Wilhelm Müller,

# Auf dem Flusse

Der du so lustig rauschtest,
Du heller, wilder Fluß,
Wie still bist du geworden,
Gibst keinen Scheidegruß.

Mit harter starrer Rinde
Hast du dich überdeckt,
Liegst kalt und unbeweglich
Im Sande hingestreckt.

In deine Decke grab' ich
Mit einem spitzen Stein
Den Namen meiner Liebsten
Und Stund' und Tag hinein:

Den Tag des ersten Grußes,
Den Tag, an dem ich ging,
Um Nam' und Zahlen windet
Sich ein zerbrochner Ring.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Wilhelm Müller *(∗1794-10-07 – †1827-10-01).*

*Arg-805-1614 (2013-01-31 21:05:31)*

*Siehe auch:* `http://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_M%C3%BCller_%28Dichter%29`.